Sci. Rev. 48 (1997)(2)

CARL StØP-BOWITZ MORTA

En la nokto de la 31-a de oktobro al la1-a de novembro mortis Carl Støp-Bowitz.
Tiu trista informo trafas ĉiujn niajn membrojn kaj multajn aliajn esperantistojn en la mondo.

ISAE funebras pri sia longjara prezidanto, kiu en multaj malfacilaj situacioj ne rezignis, sed gvidis la Asocion antauen al nova perspektivo. Ni dankas al nia altestimata prezidanto kaj honora membro pro lia senlaca aktiveco kaj lia ekzempla persona ĝentileco en la gvido de la Asocio. Lia persista engaĝo kontribuis grave al la pluekzistado de la Asocio en minaca financa kaj administa situacio. Ni ŝuldas al li grandan personan respekton pro lia prudento kaj fleksebla gvidado de la prezidantaj aferoj.

ISAE publikigas sur la venontaj paĝoj de la Scienca Revuo la tekston de la referato de Prezidanto Carl Støp-Bowitz en Prago pri la 90-jara jubileo de ISAE, per kiu li fakte finas kun testamentaj vortoj sian prezidantan periodon.

Ni honoras lin per altestima memoro.

Nome de la estraro la ĝenerala sekretario.